

Esperanto-Infomilo

65-a jaro

por Berlin kaj Brandenburgio

n-ro 665, 12/15-01/2016

Ludmilla Hypius (1911-2015) – ein Leben mit Musik und Esperanto

Ganz klar stand die Musik in ihrem Leben an erster Stelle. Schon mit fünf Jahren erlernte sie in Klotzsche bei Dresden das Klavierspiel, um ihre Mutter, die Kammersängerin war, begleiten zu können. Esperanto eignete sie sich im Alter von 65 Jahren an (1976), und welch großen Wert die Erfahrungen mit dieser Sprache fortan für sie hatten, können wir zwei Kapiteln ihrer Lebenserinnerungen für ihre Kinder, Enkel und zahlreiche Urenkel entnehmen, die sie 2006 veröffentlichte, als sie auf 95 Lebensjahre zurückblicken konnte.

Noch zu ihrem 103. Geburtstag im Mai 2014 reihte sich der Vorsitzende des Esperanto-Verbandes Berlin-Brandenburg Ronald Schindler in die Schar der Gratulanten in der AWO-Seniorenresidenz in Frankfurt (Oder) ein.

In dem Artikel der Märkischen Oderzeitung zu ihrem Geburtstag im Jahr 2011 hatte Alexandra Richter geschrieben: „Auch mit 100 Jahren hat Musik für die elegante Dame mit weißem Haar und langen Goldohrringen nichts von ihrer Faszination verloren. Sie ist Lebenselixier und vielleicht ein Geheimnis ihres hohen Alters.“

Nach dem Klavierspiel lernte sie Akkordeon und Trompete spielen. Das Leben verschlug sie an verschiedene Orte.

„Sich gegenseitig freundlich behandeln, helfen, wenn es nötig und möglich ist, leben aus eigener Kraft und leben lassen.“

Im Fichtelgebirge spielte sie die Begleitmusik zu Stummfilmen, von München aus ging sie mit anderen Musikern auf Tournee. Sie zog mit ihrer Trompete über die Dörfer. Später trat sie mit dem Humoristen Eberhard Cohrs und der „Bunten Palette“ auf.

Kurz vor Kriegsende hatte sie die furchtbare Bombennacht in Dresden erlebt. Seit 1964 arbeitete sie an der Musikschule in Eisenhüttenstadt. Hier wohnte sie von 1966 bis kurz vor ihrem 100. Geburtstag. Hier war sie Musikschullehrerin, Leiterin des Seniorenchores und der Breslacker Dorfkapelle. Hier lernte sie Esperanto und gründete eine Esperanto-Gruppe im Kulturbund. Hier wurde sie zur Ehrenbürgerin ernannt und hier wurde sie auf dem Inselfriedhof beigesetzt.

Ihren Sohn Olaf zitierte Alexandra Richter mit den Worten: „Jeglicher negative Gedanke ist ihr fremd. Sie ist geduldig und setzt stets auf Dialog und Toleranz.“

Kein Wunder, dass ihr das Esperanto mit seiner toleranten Kultur lag.

In dem Kapitel „Meine Wende“ schreibt Ludmilla Hypyus: „Der internationale Friedensgedanke förderte mein Interesse an einer internationalen Sprache. Ich war schon etwa 65 Jahre alt und lernte mit Begeisterung Esperanto, [...] so reiste ich zu internationalen Esperanto-Welttreffen nach Norwegen, Island, Frankreich, Spanien, Bulgarien, Russland usw. Auch hatte ich oft ausländische Gäste bei mir, bei denen ich vorher in den schon genannten europäischen Ländern zu Gast war. Wir freuten uns über die gute Verständigung in Esperanto.“

Und sie schreibt weiter: „Es gibt in allen Ländern bei allen Völkern in allen Berufen sehr gute charakterlich human denkende allwissende Menschen, die keine Kriege mehr wollen und eine internationale Verständigung fordern. Leider sind nur wenige Menschen dieser Art in führenden Positionen. Sie werden von den jetzigen um Geldreichtum Schachernden möglichst schnell abserviert.“

Sie beschreibt sehr genau, was ihr die Esperanto-Beziehungen gegeben

haben. „Ein kleiner Schritt, je mehr ihn gehen, umso besser.“ ist ihr Fazit. „Sich gegenseitig freundlich behandeln, hel-



fen, wenn es nötig und möglich ist, leben aus eigener Kraft und leben lassen. Das sind so meine Erfahrungen mit Norwegern, Bulgaren, Franzosen, Polen, Spaniern, Russen, Tschechen, Isländern, Engländern.“ Den Kritikern ruft sie zu: „Man muss wagen, etwas weiter voraus zu denken... Also denken wir

weiter voraus und sagen nicht abfällig ‚Spinnerei‘ dazu.“

In dem Kapitel „Angenehmes Ausland“ kommt sie auf ihre Reisen zurück. Voller Begeisterung beschreibt sie eine ihrer letzten Reisen nach Norwegen und Island, weiter nach London und über Dover nach Calais. Sie besuchte Boulogne sur Mer, die Stadt des ersten Esperanto-Weltkongresses von 1905 und fährt weiter mit ihrer französischen Freundin Marie Jeanne nach Gréssillon in Mittelfrankreich in das „Esperanto-Schloss“, wo sie sich im Jahr davor kennen gelernt hatten. Und zum Abschluss ging es noch in die Bretagne mit einem Esperantofreund, der dort ein Haus hatte und ihr seine Heimat zeigte.

Jedem sei es empfohlen, die Beschreibung dieser Reise zu lesen und die Aufgeschlossenheit und die Liebe zu Land und Menschen nachzuempfinden, mit der diese lebenserfahrene, optimistische alte Dame auf Reisen ging.

Fritz Wollenberg

Vorabdruck aus dem Jubiläumsbuch „111 Jahre Esperanto – Sprache und Kultur in Berlin und Brandenburg“, erscheint 2016 im Verlag Mondial, New York.

Quellen:

Katrin Bischoff: „Ludmilla Hypius aus Eisenhüttenstadt ist Deutschlands älteste Trompetenlehrerin [...]“, In: Berliner Zeitung vom 13.12.2003

Alexandra Richter: „Ein Leben für die Musik“, In: MOZ, Red. Frankfurt (Oder) vom 03.05.2011

Janet Neiser: „Ein Leben nach Noten“, In: MOZ, Red. Eisenhüttenstadt vom 03.02.2015

Ludmilla Hypius: „Geschichten und Erfahrungen aus meinem Leben. Für meine Nachkommen nach-erzählt.“, Books on Demand, 2006, Kapitel: „Meine Wende“, S. 67-73, „Angenehmes Ausland“, S.90-97

Johannes Moser 80-jara

En aprilo de tiu ĉi jaro Johannes Moser, unu el la plej merithavaj berlinaj esperantistoj, plenumis sian 80-an vivojaron.

Lerninte Esperanton aŭtodidakte en Pollando, li kiel 20-jarulo fariĝis estro de la Esperanto-junularo de Supra Silesio. En la jaro 1965 li ekzameniĝis kiel Esperanto-instruisto. Depost lia translukiĝo al Berlin, li en 1972 membriĝis kaj en Germana Esperanto-Asocio kaj en Esperanto-Ligo Berlin, kies sekretario kaj vicprezidanto li estis dum pluraj jaroj.

En 1977 li estis nomumita estro de la maljunula libertempejo ĉe Lietzensee, la nuna t.n. najbareca domo.

Tie li en 1977 fondis la maljunulan Esperanto-grupon „Lietzensee“, kiu funkcias ĝis hodiaŭ.

Ĝi solene festis la 10-an, 20-an kaj 30-an datrevenon de sia fondiĝo.

La maljunula centro estis ankaŭ la loko de multaj aranĝoj kaj eventoj, ekz. jarkunvenoj de la berlinaj esperantistoj,

la 90-a jubileo de la Esperantoligo Berlin en la jaro 1993.

En 1999 la grupo transprenis la malfonditan senioran ĥoruson de Charlottenburg, refonditan kiel „Rondo musicale“ kun pluraj kantistoj el la Esperantogrupoj.

De 2000 ĝis 2013 Johannes Moser kiel estro de germana IKUE (Internacia Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj) fervore laboris por la ekumeno.

Li ne nur seninterrompe tra la jaroj instruis Esperanton kaj aktivis en la Esperanto-vivo de Berlin, sed partoprenis en 17 Universalaj Kongresoj kaj en pli ol 300 internaciaj Esperanto-renkontiĝoj en tuta Eŭropo.

Esperanto-Ligo Berlin kaj Esperanto-Asocio Brandenburgio elkore gratulas la jubileanton, dankante lin pro lia senlaca laboro por la Internacia Lingvo kaj deziras al li ankoraŭ multajn jarojn de fruktodona agado.

Gerd Bussing

Pardonpeto

Certe kelkaj jam tre longe atendegas la novan eldonon de tiu ĉi Infomilo, aliaj eble ankaŭ ne.

Tamen nun okazas la nekredebla afero: ĝi reaperas, por ke la jaro 2015 ne pasu sen Infomilo.

„La Infomilo tamen ne fariĝu batal-kampo inter la diversaj kverelemuloj, sed serioza afero...“

Dum la lastaj monatoj multo okazis kaj apenaŭ eblas kolekti ĉion por tiu ĉi eldono, sed ni ja povas provi trovi interesajojn, kiuj ne nur aperu sub la titolo „ESTIS“. Unuavice ni rigardu antaŭen.

Bedaŭrinde ĉe aktivuloj ofte okazas, ke ili estas tro superŝutitaj de taskoj. Se oni aktivas, tiam tutanime. Por havi pli regulan Informilon kaj ankaŭ, por ke ĝi uzeblu por niaj internaj aferoj, mi tre serioze petas sendi al mi artikolojn, pri kiuj povus interesiĝi ankaŭ aliaj homoj.

La Infomilo tamen ne fariĝu batal-kampo inter la diversaj kverelemuloj, sed serioza afero, kiu ja ne tute neglektu fojajn ŝercojn aŭ tiun aŭ jenan anekdoton kaj rakonteton el nia propra asocia vivo.

Marc Hanisch bedaŭrinde ne disponas pri tiom da tempo por mem redakti la Informilon, sed li promesis helpon.

Do, ni agu!

Ronaldo

Tago de la Esperanta libro

La 15-a de decembro estas la naskiĝtago de L.L. Zamenhof (1859-1917), kreinto de Esperanto. Laŭ iniciato de unu el niaj signifaj verkistoj, Julio Baghy, ni festas tiam ankaŭ la Esperantan kulturon.

Por la plialtigo de la spirita nivelo de la esperantistaro, Baghy proponis ke la Zamenhof-tago estu ankaŭ la tago de la Esperanta libro. Dum kultura evento lokaj grupoj informu ne-esperantistojn pri la internacia lingvo, ties abunda literaturo originala kaj tradukita. Ni elmontru, kiel nia movado disvastigas kulturverkojn de diversaj etnoj, ebligante al alilingvanoj la ĝuadon de

verkoj alipopolaj.

Tio estu nia Zamenhof-taga kontribuo al justa, egalrajteca komunikado, kiu respektas lingvan, kulturan diversecojn, strebe al daŭripova konservado de tiuj riĉecoj, rajtoj.

Krom okazigo de kunvenoj, eventoj, prelegoj pri Zamenhof, tiutage ni celebru la Esperantoliteraturon ankaŭ per aĉeto, legado de nova libro!

Stefano Keller,
estrarano de UEA

<http://www.linguistic-rights.org/zamenhof-tago>

Afiŝoj: Peter OLIVER (grafiko) kaj tradukintoj el la tuta mondo.

Saluton,

ĉu vi ne scias, kion fari je la 12-a de decembro 2015?
Jen la alternativo al enuo kaj neniofarado!



Zamenhof-festo 2015

Ni invitas ĉiujn al agrabla kunestado dum la ĉijara jarfina, Zamenhofa kaj librofesto:

Loko: Danziger 50, salono (lifto ekzistas!),

Danziger Str. 50, 10345 Berlin

Tempo: 12-a de decembro 2015, 15:00*-20:00 h

Baza programo:**

- Malfermiĝo/festprelegeto
- Salutvortoj de gastoj
- Koncerteto de Stephan Schneider
- Prezentaĵoj de libroj - Historio de la Esperanto-literaturo
- Trilingva vortaro
- Kio estas Duolingo?
- Filmo pri la somera festo sur Esperanto-placo Berlin
- Vojaĝo al dumvintra Brazilo
- Babilado
- Libroservo funkcios dum la tuta tempo
- Vizitu ankaŭ la unikan kristnaskan foiron en Kulturbrauerei

Do, venu amase kaj ĝuu internacian kaj ne forgeseblan etoson,
pligrandigu vian librotrezoron kaj ĝojigu la stomakon per unika bufedo de
frandaĵoj aŭ simple babilu kun malnovaj aŭ novaj amikoj aŭ havu ideojn
por kristnaskaj donacoj!

Paroprenkotizo: 2,50 € (pro muziko kaj bufedo)

Ni vidos nin en Berlino,

Ĝis tiam

Ronaldo

prez. EABB/ELB

Kontakto por demandoj pri alvojaĝo aŭ aliaj detaloj: RonaldSchindler@web.de

* preparado ek de la 14-a horo por helpemuloj

** programŝanĝiĝoj eblas

Libroj de Potsdamo savitaj

Post multaj jaroj kaj intertempaj petoj de potsdamaĵoj la grava tasko estas plenumita!

Longtempe jam kvin grandaj pakajoj kun libroj, ĵurnaloj kaj aktoj dormis en la domo de la biblioteko kaj lego-kafejo konte[:x]t, kiu situas en Hermann-Elflein-Str. 32 en la centro de Potsdamo. Al ĝi komence de la 1990-aj jaroj aldoniĝis la literaturaĵoj el la Zamenhof-Biblioteko en Potsdamo post ties fermo en Berliner Straße.

Dum aprilo 2015 ni hazarde estis alskribitaj de fem_arkivo, ke ili deziras donaci Esperanto-librojn. Ekestis vigla korespondado, sed la bonŝanco ne estis je nia flanko. La sendintoj hazarde ne plu estis atingeblaj, kvankam mi mem jam staris antaŭ la domo por akcepti la

librojn. En julio 2015 okazis la dua provo flanke de la administrantoj de la domo, kaj oni finfine sukcesis aranĝi konvenan daton. Mi per aŭtomobilo veturis al Potsdamo, amiko Mütze antaŭe certigis spacon por la agado surstrate kaj ververe venis kvin grandaj bananaj skatoloj, plenŝtopitaj de libroj kaj papearaĵoj. La tuta skatolaro estis transportita al la kelo de Henryk Wenzel, kiu estis seka kaj sufiĉe taŭga por la stokado de la libroj. La sekvonta tasko estu elekti la konservindajn librojn, ĉar kelkaj el ili ekzistas en pli ol 10 ekzempleroj. Sed povas esti, ke inter ili troviĝas pluraj raraĵoj, kiujn indas meti en la nunan bibliotekon. Eble troviĝos ankaŭ dokumentoj, kiujn oni konservu en arkivo.

Ronald Schindler

Libroj por Espoteko

Ni volonte sekvas la bonan ekzemplon de Gerd Bussing en Esperanto-Informilo n-ro 664, p. 7, kaj prezentas

Becker, Ulrich (2011, Red.): Interlinguistik und Esperantologie. Bibliographie der Veröffentlichungen von Detlev Blanke. New York: Mondial, 234p.

Blanke, Detlev (2003a): Interlinguistik und Esperantologie: Wege zur Fachliteratur 58 p.

Blanke, Detlev (2003b, Red.): Beiträge zur Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR. Berlin, 203p.,

liston de libroj, en 2014 donacitaj al Espoteko.

Wera kaj Detlev Blanke

Blanke, Detlev (2006): Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen. Frankfurt/Main, 405 p.

Blanke, Detlev (2007): Esperanto kaj socialismo? Pri la movado sur la 'alia flanko'. New York: Mondial, 64 p.

Blanke, Detlev / Krasnikov, Oleg (2008) Esperanto-dviženie: fragmenty istorii. (Esperanto-movado: fragmentoj el la historio). Moskva: Impeto, 214 p., En la libro estas:

Krasnikov Oleg: Istorio Sojuzo Ĝesperantistov Sovetskich Respublik (Historio de la Sovetrespublikara Esperantista Unio), p. 7-114. kaj:

Blanke, Detlev: Istorija Raboĉego ĝesperanto-dviĝenija (Historio de laborista Eperanto-movado) p. 115-215.

Blanke, Detlev / Scharnhorst, Jürgen (2009, Red.): Sprachenpolitik und Sprachkultur. Frankfurt/Main: Peter Lang, 280 p.

Blanke, Detlev / Stefan Panka (2010, Red. kaj Kompil.): Karl-Hermann Simon, Lexicon silvestre. Beiträge zum multilingualen Wörterbuch des Forstwesens. Eberswalde: Förderverein „Lexicon silvestre“ e. V., 183 p.

Blanke, Wera (2008): Esperanto – Terminologie und Terminologiearbeit. New York: Mondial 153 p.

Blanke, Wera (2013): Pri terminologia laboro en Esperanto. Elektitaj publikaĵoj. New York: Mondial, 318 p.

Brosch, Cyril / Fiedler, Sabine (2011, Red.): Florilegium Interlinguisticum. Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag. Frankfurt/Main: Peter Lang, 424 p.

Levsen, Peter / Paul Lindner (2002): Die Esperanto-Serie in „Der Morgen“ 1965 - 1990. (Paul Lindner estis esperantisto kaj redaktoro de la gazeto „Der Morgen“; Peter Levsen estis pseŭdonimo de Detlev Blanke.) 600 p.

Lewoc, Joanna (2008, Red.): Interkomunikaj Variacioj. Göttingen: Leins Verlag, 123 p.

Marx, Karl / Engels, Friedrich (1990): Manifesto de la Komunista Partio. Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke. Moskvo: Progreso, 82 p.

Pfennig, Werner (2002): I Die Esperanto-Bewegung in den Strukturen des Kulturbundes aus der Sicht des Bezirksvorstandes GDREA Neubrandenburg.

II Über zentrale und bezirkliche Seminare zur Qualifizierung der Zirkelleiter und ehrenamtlichen Leitungen durch GDREA. Berlin, 54 p. + aldonajoj.

Wollenberg, Fritz (2002): Chronik zur Geschichte des Esperanto in Ostberlin 1945-1991. Ein Arbeitsmaterial. Berlin, 85 p.

Wollenberg, Fritz (2008): Interview mit Ludwig Schödl. Berlin, 48 p.

Duolingo – grava helpo por Esperanto

Ekde la 28-a de majo 2015 eblas lerni la Internacian Lingvon Esperanto ankaŭ per la anglalingva interreta portalo “Duolingo”. La projekton realigis Chuck Smith, spertulo kaj en ambaŭ lingvoj kaj en komputilaj aferoj.

Jam pli ol 166 000 homoj el la tuta mondo eklernis Esperanton per Duolingo, kaj tiu nombro konstante kreskas,

je ĉ. 1000 lernemuloj ĉiutage. Tio povas rimarkinde kontribui al la pli-grandigo de la Esperanto-parolantaro.

Oni povas atingi la nivelon de simpla interbabilado jam ene de ses tagoj. Eĉ kritikantoj devas agnoski, ke temas pri unika ebleco eklerni Esperanton per rete apud aliaj retejoj.

Ronald Schindler

Esperanto-printempo en Szczecin

Inter la 18-a kaj 20-a de aprilo 2015 en urbo Szczecin (Ŝĉeĉino) okazis treege interesa kaj bone preparita la dua printempa renkontiĝo - Ŝĉeĉina Esperanta Printempo 2015.



La ĉi-jara ĉefa temo estis „Ŝĉeĉino - malnova havenurbo“.

La aranĝo komenciĝis per koncerto en la nova filharmonio. Sabate partoprenantoj promenis laŭ la Aleo de Velŝipistoj kaj poste ŝipvojaĝis. En la Kastelo de Pomeriaj Princoj okazis la prelego de Andrzej Broda pri la temo „Ĉu Esperanto estas simpla kaj facila?“. Poste estis Internacia Turniro de Kalemburoj kaj kafoklaĉoj. Sekve estis prezentiĝo de loka muzikisto. En dimanĉo partoprenantoj vizitis la Katedralon kaj la placon de Blanka Aglo, kie ili faris proprajn esperantajn dol-ĉaĵojn.

Karolina Rzeszuto

Invito al Szczecin 2016

Karaj gesamideanoj! Ni elkore invitas vin por partopreni nian venontjaran aranĝon dum kiu ni celebros la 60-jaran jubileon de Esperanto Klubo en Szczecin - Filio de PEA.

Ŝĉeĉina Esperanta Printempo 2016

okazos ekde 22 ĝis 24 de aprilo 2016.

La gvidtemo de la aranĝo estos „Verda Ŝĉeĉino“.

Pri detaloj bonvolu viziti nian retpaĝon: www.esperanto.szczecin.pl

Irena Natalia Tomaszewska

ARKONES 2015

De la 25-a ĝis la 27-a de septembro 2015, tuj post la sesio de Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz, okazis en Poznano (Pollando) la jam tradicia, 31-a festivalo de esperantistaj kulturo kaj arto ARKONES - ARTaj KONfrontoj en ESperanto.

La pasintjaran, do la 30-an aranĝon partoprenis pli ol 200 homoj el 24

landoj, ĉi-jare aliĝis „nur“ 130 konfrontemuloj el 16 landoj. La organizantoj pretigis por la partoprenantoj koncertojn, prelegojn, prezentadojn, spektaklojn kaj aliajn eventojn.

Unuafoje en Poznano koncertis la grupoj Sepa kaj Asorti. Ni ankaŭ povis ĝui koncertojn de Zuzanna Kornicka, Ĵomart kaj Nataŝa, Melono Desnos kaj Anjo Amika.

Paweł Janowczyk sukcese laboris en la libroservo. Ankaŭ Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, konataj de „La Ondo de Esperanto“, ofertis interesajn librojn kaj memkompreneble la ĵurnalon mem. Ambaŭ servoj ankaŭ jam estas tradiciaj.

Memkompreneble interesaj prelegoj pri la plej diversaj temoj ne mankis. Oni bone devis organizi sian propran programon, ĉar samtempe okazis diversaj prelegoj. El la amaso da prelegoj certe elstaris la lanĉo de la verko “Historio de Esperanto-literaturo” de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, prezentita de Tomasz Chmielik, „Spritaj splitoj kaj preskeraroj“ de István Ertl kaj la prezentaĵo „Esperanto kaj la “longa vosto” en interreto“ de Lu Wunsch-Rolshoven. Kaj mi ne forgesu la prelegon de Luiz Fernando Dias Pita el Brazilo pri la

„Lingvo kaj kulturo de Tupioj, la unuaj brazilanoj“. Oni ankaŭ povis ĝui rigardon al la 30-a ARKONES per majstre aranĝita filmo de Irek Bobrzak el Varsovio kaj multajn aliajn programerojn.

Laŭ mia kutimo mi partoprenis nur dum la sabato, pro tio mi ne sukcesas pritrakti ĉi-tie la tutan aranĝon, sed almenaŭ la programo de tiu ĉi tago tre plaĉis al mi, kvankam la anoncita ekskurso al la urbo, kiun ĉiĉeronus Jakub Rebelski, ne okazis.

Denove la aranĝo, kiun i.a. partoprenis kelkaj berlinaj kaj brandenburgiaj samideanoj, instigis al reveno sekvontjare.

La aliĝilo kaj la programo ĝustatempe estos troveblaj en la retejo: www.arkones.org.

Ronald Schindler

EMAS invitas

Printempa Revido 2016 de EMAS okazos en Bremeno la 5-an de marto 2016.

La "kongresejo" estos la Transmara Muzeo apud la ĉefstacidomo. La muzeo konvenas al Esperanto pro sia multkultureco. La muzeo temas pri etnografio, religio, biologio, geologio kaj... Ne eblos rigardi ĉion dum unu tago.

Kompreneble geamikoj el aliaj landaj ligoj kaj aliaj landoj estos bonvenaj. Antaŭ kelkaj semajnoj ni spertis ege instigan komunan renkontiĝon kun la geamikoj de Hamburgo en Celle.

En la Transmara Muzeo estos unu aŭ

du gvidadoj kaj iu muzikaĵo. Kompreneble eblos malkovri la muzeon laŭplaĉe kaj babili. Estas multaj seĝoj kaj benkoj en la muzeo.

En la teretaĝo troviĝas la kafejo / manĝejo Übersee. Tie ni povos tagmanĝi kune. Krome la jarĉefkunveno de EMAS okazos tie.

Bv. noti la daton. Mi ĝojus revidi vin en Bremeno.

Pliaj detaloj pri la programo sekvos dum la venontaj monatoj.

Salutas el Hameln

Thomas Heberlein
prezidanto

2015 ein Jahr mit zwei Mitglieder- versammlungen

1. Jahres- hauptversammlung

Die Jahreshauptversammlung sowohl für den EVBB als auch der ELB fand am Samstag, dem 21.02.2015 im Kulturzentrum danziger50, Berlin statt. Es wurden die Rechenschaftsberichte für das Jahr 2014 vorgestellt.

Unter anderem wurde den Todesfällen, die 2014 zu beklagen waren, nämlich Helmut Krone, Dieter Berndt (beide Berlin) und Ludmilla Hypius (Eisenhüttenstadt) eine Gedenkminute gewidmet.

Der Kassenbericht wurde vom Kassierer Christoph Hoppe vorgelegt. Des Weiteren erfolgten die Kassenprognose für 2015 und Berichte der Kommissionen.

Der Vorstand wurde entlastet. Die Wahlen des Vorstands von EVBB und ELB wurden unter dem Wahlleiter Peter Kühnel durchgeführt.

Mit 3 Enthaltungen und einer Gegenstimme wurden letztendlich folgende Mitglieder in den Vorstand des EVBB und der ELB gewählt: Ronald Schindler, Vorsitzender, Paul Ebermann, stellv. Vorsitzender, Christoph Hoppe, Kassierer sowie Johann Pachter, Vorstandsmitglied.

Als Kassenprüfer wurden Ulrich Bungenstock und Henryk Wenzel (beide Berlin) gewählt.

In die Beschwerdekommision wurden folgende Mitglieder gewählt: Sibyl-

le Bauer, Peter Kühnel (beide Berlin) und Marc Hanisch (Potsdam).

Über einen Beauftragten für Kommunikation und Werbung konnte man sich nicht einigen.

Von Paul Ebermann wurde eine Satzungsänderung zugunsten einer neuen Mitgliederkategorie, „Örtliche Mitglieder“, in der ELB vorgestellt und erläutert.

Über die Beitragsordnung für diese neue Mitgliederkategorie wurde ebenfalls befunden.

Großen Raum nahm die Diskussion zur weiteren Nutzung des Esperanto-Hauses Berlin-Lichtenberg als Esperanto-Kulturhaus ein. Inzwischen wurden die damaligen Vorstellungen von der Wirklichkeit eingeholt.

Zum Abschluss wurden verschiedene Vorhaben und Termine für das Jahr 2015 vorgestellt.

2. Außerordentliche Mitgliederversammlung

Anlass der außerordentlichen Mitgliederversammlung am 12.09.2014 im Kulturzentrum Danziger50, waren die Ankündigungen von zwei Vorstandsmitgliedern, dem Vorstand nicht länger zur Verfügung zu stehen.

Außerdem gab es Klärungsbedarf hinsichtlich des Esperantohaus und der Esperanto-Bibliothek.

Aufgrund der geringen Teilnehmerzahl, war die Mitgliederversammlung nur bedingt beschlussfähig und die beabsichtigte Wahl des Vorstands wurde nicht durchgeführt.

Zu den nächsten Jahreshauptversammlungen von EABB und ELB wird schriftlich über den Esperantoladen in der Katzbachstraße eingeladen.

Johann Pachter hatte erklärt, dass er dem Vorstand nicht mehr zur Verfügung stehen werde. Paul Ebermann ließ seinen Posten ruhen. Somit blieben vom Vorstand nur Christoph Hoppe und Ronald Schindler. Eine Vorstandsarbeit war unter diesen Umständen schwierig durchzuführen.

Weitere Vorschläge/Kandidaturen gingen auch bis zur Mitgliederversammlung beim Vorstand nicht ein. Zur Kandidatur von Peter Kühnel gab es keine unterstützenden Meinungen unter den anwesenden Mitgliedern. Es wurden während der Mitgliederversammlung mehrere Kandidaten vorgeschlagen, die sich aber nicht abschließend äußerten.

Es wurde festgelegt, dass der gegenwärtige Vorstand seine Arbeit fortsetzen möge bis zur Findung eines neuen Vorstandsmitglieds. Nach persönlicher Rücksprache mit Paul Ebermann am 26.09.2015 steht dieser weiterhin dem Vorstand bis zur nächsten Jahreshauptversammlung zur Verfügung, die Anfang 2016 stattfinden wird.

Es wurde auch der Antrag gestellt, die Statutänderungen zurück zu nehmen. Der Antrag fand breite Zustimmung, zumal es auf Grund der

Statutänderung für eine weitere Mitgliederkategorie bisher keine Neuankömmlinge für die ELB gab.

Da das Statut mit seinen Änderungen bereits beim Amtsgericht vorlag, bleibt die Änderung vorerst bestehen. Es wird die weitere Entwicklung abgewartet. Zwischenzeitlich wurde die Satzungsänderung durch das Amtsgericht Charlottenburg angenommen.

Erneut war das Esperanto-Haus bzw. die Remise ein großes Thema, auch in Verbindung mit der Bibliothek. Durch Christoph Hoppe wurden Ausführungen zu möglichen Kosten und Folgen für den Verband dargestellt.

Der Vorstand EABB/ELB einschließlich der anwesenden Mitglieder rieten von der Fortführung des Projekts „Esperanto-Kulturzentrum“ (EKC) Berlin-Lichtenberg ab. Dieses Meinungsbild entstand vor dem Hintergrund der Kosten und der letzten Ereignisse. Notwendig bleibt jedoch ein Raum für Bücher und das Archiv.

Die Bücher, Zeitschriften und Akten wurden für einen begrenzten Zeitraum auf die Wohnung von Gerd Bussing (repräsentativer Teil der Bibliothek), den Keller von Henryk Wenzel (Zeitschriften) und die Garage von Felix Zesch (Restbücher) verteilt.

Danach sollte eine repräsentative Bibliothek eingerichtet werden, z.B. im Kulturzentrum Danziger50, in dem dann auch Neuerwerbungen aus dem Maier-Erbe finanziert werden könnten.

Die Zeitschriften des DEB wurden bereits nach Sieber bei Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt in ein leer

stehendes Feuerwehrhaus gebracht. Diese Möglichkeit könnte auch für Berlin genutzt werden.

Auf Grund der neuen Situation, ist das Erbe des Sprachfreundes Maier andersweitig einzusetzen. Ehemalige Beschlüsse der Mitgliederversammlung und des Vorstands wurden damit gegenstandslos.

Es können wieder Vorschläge für die Verwendung des Erbes gemacht werden. Das Erbe ist für Berlin zweckgebunden, dazu gehört z.B. die Förderung von Veranstaltungen und des Jubiläumsbuches.

Die Ĵaŭda Rondo findet mit stark schwankender Teilnehmerzahl gegenwärtig bei Gerd Bussing statt. Die Notwendigkeit der Findung eines anderen Raumes bleibt bestehen.

Ein weiteres Problemfeld ist weiterhin das Infomilo, da der Redakteur seinen Posten aufgeben musste. Trotzdem wird jedes Mitglied aufgerufen, Beiträge zu liefern.

Die vollständigen Protokolle zu beiden Versammlungen sind unter: <http://esperanto.berlin/verein/dokumente> zu finden.

Kontaktaten des Vorstands EABB / ELB

Auf Wunsch mehrerer Mitglieder, hier die Kontaktaten (Email, Telefonnummer) des Vorstands:

Ronald Schindler, RonaldSchindler@web.de, +49 (33605) 524 138

Christoph Hoppe, CFAHo@web.de, +49 (30) 345 483 6

Paul Ebermann, Paul.Ebermann@esperanto.de

Ĵaŭda Rondo kaj biblioteko provizore en Charlottenburg

Jam de kelkaj monatoj la Ĵaŭda Rondo en plu okazas en Lichtenberg, sed en la privata loĝejo de Gerd Bussing en Knobelsdorffstraße 29/31 en Charlottenburg (vd. la kalendaron).

Pro la evoluo en kaj ĉirkaŭ la Esperantodomo estiĝis la neceso, abrupte forlasi la tradician ejon. Tio koncernis ankaŭ la tie stokitajn librojn kaj ĉiujn aliajn materialojn.

Danke al la senlaca helpopreteco de pluraj samideanoj la fortransportado efektiviĝis senprokraste.

Selekto de la libroj trovis provizoran azilon sur la bretaroj de Gerd Bussing, ĉio alia en sekaj keloj de kelkaj helpemaj berlinaj esperantistoj.

Pro pli detalaj informoj, ankaŭ rilate la librojn, bv. telefoni al 030 344 12 76.

Gerd Bussing

Esperanto-placo Berlin – 2015-09-09

Neimageble, la Esperanto-placo, iniciatita de la berlina samideanino Eva Hoffmann jam ekzistas ekde 1991 kaj estis novigita en la jaro 2008, siatempe okazis triplaca festo, oni kunligis tri proksimajn placojn, la Böhmischen Platz, la Esperanto-placon kaj la placon ĉe la Kannerstraße.

Ekde tiam oni ĉiujare renkontiĝas en granda rondo kune kun la najbaroj kaj diversaj artistoj kaj institucioj, por celebri komunecon de ĉiuj ĉirkaŭloĝantoj kaj entreprenoj. Mi certe supozas, ke mi mem apenaŭ maltrafis tiun kunvenon.

Ĉi-jare la festo eĉ havis honoran patroninon, la urbestrinon de Neükölln, drino Franziska Giffey, pri kio ni ĝojas speciale. La artisto Christoph Böhm ĉi-jare komencas instali la „Birdan / Mondan / Urbon“. Longjara gasto, la fama artistino Adler A.F. bedaŭrinde ne povis nin ĝojigi per la speciala kaj tradicia programero pro familiaj kaŭzoj.

Antaŭ la festoj kutime necesas purigi

kaj la placon kaj la ĉirkaŭaĵon. Tiu purigado ankaŭ jam fariĝis tradicio kaj trovis multajn kunlaborantojn. Kelkfoje eĉ necesas helpi al la helpintoj. Mia plej granda deziro tamen estas, ke la daŭra purigado malpliigu kaj ke la preterpasantoj atentu purecon kaj uzadu la paperujojn aŭ simple kunportu siajn rubaĵojn hejmen.

La Esperanto-placo pli kaj pli fariĝu simbolo de interkompreniĝo, laŭ ĉiuj diversaj aspektoj. Neükölln ja tradicie jam estas fando de kulturoj kaj moroj. Sub la nuntempaj kondiĉoj eĉ pli multe. La projekto rilate al la internaciaj „birduoj“ kresku kaj multaj homoj aldonu ideojn.

De nia flanko ni speciale danku al Fritz Wollenberg, kiu neniam laciĝinte kaj ĉiam kun granda energio organizadis ĉiujn aferojn flanke de Esperanto Ligo Berlin kaj en la pli kaj pli kreskanta preparteamo de tiu loka festo.

Ronald Schindler

Internacia Renkontiĝo en Prenzlau 2015

La 25-an de aprilo 2015 okazis la jam tradicia Esperanto-aranĝo en la urbo Prenzlau, kiun denove tre bone organizis Edeltraut Henning. Ĉi-jare denove partoprenis esperantistoj el Meklenburgio-Antaŭpomerio, Brandenburgio, Berlino kaj Pollando. Precipe menciindas granda grupo el Szczecin.

Okazis interesa ŝipekskurso, dum kiu ni survoje povis rigardi belajn pej-

zaĝojn, kastorajn burgetojn, veturante sur du belaj lagoj. Tre impresis la kanalo inter ambaŭ Ucker-lagoj, kiu plej parte estas natura akvofluejo. Dum la ŝipekskurso videblis multaj birdoj. Post la rigardo de la naturo ni ĝuis bonajn manĝaĵojn en itala restoracio, en kiu i.a. Fritz Wollenberg prezentis la staton de la nova Jubilea Libro.

Ronald Schindler

Kontaktoj

Pro manko da spaco bonvolu viziti <http://esperanto.berlin>
por aktualaj datoj.

Germana Esperanto-Asocio

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin
tel.: 030 510 629 35, infozentrum[ĉe]esperanto.de
IBAN DE32508519520040114571, BIC: HELADEF1ERB

Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj Esperanto-Liga Berlin e.V.:

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin, eabb[ĉe]esperanto.de
IBAN: DE45 1203 0000 1020 2018 67, BIC: BYLADEM1001
Prezidanto: Ronald Schindler

EsperantoLand e.V.

Lu Wunsch-Rolshoven, tel.: 030 685 5831, esperantoland[ĉe]esperantoland.de,
www.EsperantoLand.de

Esperanto? Plenbuŝe! - praktikada tablorondo

Philippe Beaudonnet, tel.: 030 217 562 33, philippe.beaudonnet[ĉe]gmx.net

Ĵaŭda Rondo

renkontiĝejo: Knobelsdorfstraße 29/31, 14059 Berlin

Grupo Lietzensee

Hans Moser, tel.: 030 8621411

Esperanto-Infomilo por Berlino kaj Brandenburgio estas la oficiala organo de Esperanto-Asocio Berlino-Brandenburgio r. a.

Eldonas/Herausgeber:

Esperanto-Asocio Berlino-Brandenburgio r. a. Esperanto-Verband Berlin Brandenburg e. V.

Responsas/V.i.S.d.P.:

Ronald Schindler, prezidanto
Katzbachstr. 25 · 10965 Berlin – www.esperanto.berlin · eibb [ĉe] esperanto.de

Enpaĝigis/Satz:

Marc Hanisch · Farita per Scribus (<http://scribus.net>)

Litertiparo/Schrift: Gentium (<http://scripts.sil.org>), PT Sans (<http://www.paratype.com/public>)

En la artikoloj nur esprimiĝas la opinioj, deklaroj, rekomendoj ktp. de la unuopaj aŭtoroj, ne de la asocioj, estraroj ktp. aŭ de la responsulo, krom alia estas eksplicite indikata.

La redakta limdato por la venonta numero estas la 1-a de februaro 2016.